

Okdek jaroj de esperanta vivo, 11-a parto
De Volapük al Idiom Neutral
Claude Gacond, 189-a radioprelego, 1967.05.24 & 1967.05.27

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La voĉdono de 1894 malkontentigis kaj senesperigis la reformeman skolon. Ili komprenis, ke se en tempo kiam ne ekzistas literaturo, la esperantistaro sin prononcas kontraŭ ĉia reformo, tiu sama esperantistaro estontece kontraŭstaros ĉian novan reform-proponon.

A.- Por la reformemuloj plia kunlaboro kun la esperantistoj ŝajnis perdita tempo. Nur ekster la esperanta movado ili povos kunlabori al la verkado de pli taŭga internacia lingvo.

Cl.- En pasintaj elsendoj ni jam parolis pri la sinteno de Edgar von Wahl kaj Antoni Grabowski. Hodiaŭ ni iom ekzamenis la sintenon de aliaj reformemuloj.

A.- La mecenato Trompeter ne volis pli longe subvenciadi la eldonon de la gazeto *La Esperantisto*, organo kies abonantaro esprimis la deziron vidi ĉesi ĉian diskuton pri reformoj.

Cl.- Tiam *La Esperantisto* havis 717 abonantoj. Zamenhof ne povis akcepti la malaperon de la sola ligilo inter la esperantistoj. Sed al li mankis la financaj rimedoj por garanti pluan ekzistadon de tiu gazeto. Li tamen streĉis siajn lastajn fortojn por plua plenumi sian redaktorecon.

A.- La okazaĵoj kontraŭos lian volon kaj jam en aprilo 1895 *La Esperantisto* definitive malaperos. La priskribo de tiuj okazaĵoj reliefigas la tiaman malforton de la esperantistaro.

Cl.- Kelkajn jarojn antaŭe la volapuka movado travivis gravan krizon. Kiel en la esperanta movado du tendencoj alfrontiĝis. Ĉirkaŭ Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de la lingvo, grupiĝis la konservativuloj kaj ĉirkaŭ Auguste Kerckhoffs, fondinto de Franca Asocio por la disvastigo de Volapük, grupiĝis la reformemuloj.

A.- Sinsekve estis okazintaj tri Internaciaj Kongresoj. En la dua, kiu kunvenis en München (Munkeno) en aŭgusto 1887, do dum la naskiĝa jaro de esperanto, estis fonditaj Universala Volapuka Asocio (Volapükaklub Valemik) kaj Volapuka Akademio (Kadem Bevünetik Volapüka).

Cl.- Johann Martin Schleyer estis elektita dumviva estro (Cifal) de la Universala Volapuka Asocio kaj Auguste Kerckhoffs direktoro (Dilekel) de la Volapuka Akademio. En aŭgusto 1889, dum la Tria Volapuka Kongreso, kiu okazis en Parizo, simpligo de la volapuka gramatiko estis decidita sub la influo de la Dilekel Kerckhoffs. La Cifal Schleyer rifuzis sin submeti al tiu decido. El tio naskiĝis interna skismo en la volapuka movado. Schleyer ne plu akceptis kunlabori kun la Akademio.

A.- Post tiu tria kaj fakte lasta volapuka kongreso August Kerckhoffs proponis al siaj akademiaj kolegoj projekton pri nova volapuka gramatiko. Sed aliaj akademianoj faris aliajn kontraŭajn proponojn. Kiel inter la esperantistoj regis subjektiveco, tial interkonsento ne eblis. En 1891 Kerckhoffs demisiis.

Cl.- Vi pensas: « *Kian rilaton kun esperanto povas havi tiu volapukista krizo?* » Jen vi komprenos. Trimembra komitato estis formita por elekti novan direktoron. Sub la nomo **Glamat nomik** tiu komitato aperigis norman gramatikon, kiu ĝisfunde ŝanĝis la lingvon Volapük. Woldemar Rosenberger el Sankt-Peterburgo estis elektita prezidanto. Ni estas en 1893, kiam akriĝas la prilingvaj disputoj inter la esperantistoj.

A.- La eksvolapukistaj esperantistoj ne restis indiferentaj dum tiu volapuka konflikto. Ili interesiĝis pri la reformo proponita de la Akademio. Kaj la esperantistaj reformemuloj ekzamenis tre atente tiun reformon. Eble la lingvo, kiun ĝi naskos, pli taŭgos ol esperanto.

Okdek jaroj de esperanta vivo, 11-a parto
De Volapük al Idiom Neutral
Claude Gacond, 189-a radioprelego, 1967.05.24 & 1967.05.27

Cl.- Sub la lerta gvidado de Woldemar Rosenberger la Volapuka Akademio rapide ekverkis tute novan lingvon, kiu ricevis la nomon **Idiom Neutral**.

A.- Komparo inter la kristana preĝo *Patro Nia* en Volapük kaj en Idiom Neutral donos al vi ideon pri la radikaleco de la lingva reformo. Jen parto de tiu preĝo en Volapük [la akcentita vokalo estas grasigita] :

Cl.- « *O Fat obas, kel binol in süls, paisaludomöz [paisaludomöc] nem ola ! Kömomöd monargän ola ! Jenomöz [šenomöc] vil olik, äs in süil, i su tal ! Bodī obsik vädeliki givolös obes adelo ! E pardolös obes debis obsik, äs id obs aipardobs debeles obas. E no obis nindukolös in tentadi ; sod aidalivolös obis de bad. Jenosöd ! [šenosöd] »*

A.- Vi certe nenion komprenis. Volapük ŝajnas absolute fremda al la neinicitoj. Kaj ĝia melodio akras. Idiom Neutral konservis parton el tiu akreco. En tio ĝi estas la heredanto de Volapük. Sed al eŭropano, aŭ pli precize al parolanto de latinida lingvo, ĝi estas facile komprenebla. Aŭdu :

Cl.- « *Nostr patr kel es in sieli ! Ke votr nom es sanktified; ke votr regnia veni; ke votr volu es fasied, kuale in siel, tale et su ter. Dona sidiurne a noi nostr pan amnidiurnik ; e pardona a noi nostr debiti, kuale et noi pardon a nostr debitatori ; e no induka noi in tentasion, ma librifika noi da it mal. »*

A.- Tiu Idiom Neutral gramatike estas multe pli simpla, ol esperanto. Nek artikolo, nek akuzativo ekzistas. La adjektivoj restas senŝanĝaj. Jen tri punktoj tre gravaj je la okuloj de multaj reformemuloj de esperanto.

Cl.- Plie Idiom Neutral estas proponata kiel bazo permesanta prilingvajn diskutojn inter la adeptoj de la diversaj lingvoj internaciaj. Tiu ideo estis tre alloga por la diskutemaj teoriemuloj. Pro tio en la movado Idiom Neutral ni trovos la reformemulojn, kiuj venenis la esperantan vivon inter 1887 kaj 1894.

A.- Dum pluraj jaroj Idiom Neutral konkurencos esperanton, kiel antaŭe tion faris Volapük. Pri tio ni hodiaŭ estas malbone informataj, ĉar tiam la esperantistoj per ĉiuj eblaj rimedoj provis silenti pri tiu grava konkuranto. La esperantistoj, kiuj havis amikajn rilatojn kun la neŭtralistoj estis rapide konsiderataj kiel perfiduloj.

Cl.- Personigo de la perfidulo fariĝis Christian Schmidt, la prezidanto de la Mondlingva Klubo en Nürnberg. Tiu piliero de la esperantismo, post la voĉdono de 1894, ne nur persone forlasis esperanton por aliĝi al Idiom Neutral, sed lia tuta klubo sekvis lian ekzempon, kaj poste multaj germanaj esperantistoj.

A.- La historio ripetigas. Sed nun la esperantistoj troviĝas en la malbona flanko. Estas la neŭtralistoj, kiuj ĝojegas pro tiu konvertiĝo. La esperantistoj forgesas la kuraĝan sintenon de Christian Schmidt en 1888, kiam li transiris de Volapük al esperanto kun sia grupo. Ili ne povas imagi, ke tiu homo tute sincere deziras servi la kaŭzon de la lingvo internacia. Ili ne povas akcepti, ke oni servu tiun kaŭzon ekster esperanto.

Cl.- Zamenhof deziras stari super tiuj pasiaj reagoj. En 1895 en *La Esperantisto* li publike dankas al Trompeter kaj malkovrigas al la esperantistoj la gravan rolon de tiu samideano. Aŭdu:

A.- « *Fine venis la momento, kiam malgraŭ ĉia plej bona volo, malgraŭ ĉiaj niaj penoj, ni, tro forte alpremitaj de la cirkonstancoj, ne povis plu daŭrigi la aferon.*

Okdek jaroj de esperanta vivo, 11-a parto
De Volapük al Idiom Neutral
Claude Gacond, 189-a radioprelego, 1967.05.24 & 1967.05.27

Cl.- *Tiam kun helpo aperis s-ro W. H. Trompeter. Li ne sole prenis sur sin la eldonadon de nia gazeto, ne timante ĝian deficiton, sed li ankoraŭ difinis salajron de cent markoj ĉiumonate al la redaktoro, por ebligi al li pluan laboradon por nia afero kaj por ĝia organo, La Esperantisto.*

A.- *Tiam la unuan fojon nia afero ricevis teron sub la piedoj. Ĝi komencis regule disvolviĝadi. [...]*

Cl.- *Dum en la kriza tempo aliaj amikoj per vortoj **bedaŭris**, s-ro Trompeter sen vortoj **agis** kaj savis nian aferon. Lia nomo ĉiam brilos kiel luma stelo en la historio de nia afero. »*

A.- Tiu alvoko al rememoro pri la heroaj agoj de unu el la estroj de la reformisma skolo alportis iom da freŝa aero en atmosfero pasie malboniĝanta.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-